

EKO 2021

Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok
jaroj, de post 2013

2020: rekorda jaro:
kun 60 komunikoj

Subtene al la loka,
landa, faka kaj
regiona agado

EKO 2021-11 sendita el Budapeŝto la 17an de marto.

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Hector Hodler: Pacisma sinteno ĉe la fondinto de UEA

La jaro 2020 estis proklamita la Hodler-Jaro kun diversaj eventoj en rilato kun la centa datreveno de la forpaso de Hector Hodler (1887-1920), kiu fondis la Universalan Esperanto-Asocion (UEA). La Arkivoj Jura Brüscheweiler (AJB), kunlabore kun Svisa Esperanto-Societo kaj UEA, volis konkludi tiun gravan jaron per aperigo de libro, kie la leganto malkovros informojn pri la vivo kaj la pensoj de tiu personeco, kiu profunde markis la Esperantistaron kaj la pacisman movadon de la komenco de la dudeka jarcento.

La libro havas 230 paĝojn kaj kostas en Svislando 36 CHF. La aŭtoroj estas sube prezentitaj. Ĝi entenas multajn bildojn, pentraĵojn, fotojn kaj manuskriptojn; ĝi entenas antologion, indekson, kaj abundajn fontindikojn. La libro estas mendebla en librovendejoj kaj per Amazon. La libro estas dulingva: en Esperanto kaj la franca. La tradukojn faris Mireille Grosjean.

Surbaze de ankoraŭ ne konataj dokumentoj la verko provas prezenti la vivon de Hector Hodler tra liaj pensoj kaj agadoj, de la junaĝaj lernejoj al la starigo de humanaj agadoj dum la unua mondmilito. Tiu eseo metas la junulon en la kuntekston, kie naskiĝis liaj unuaj ideoj, esploras profunde la demandon pri Esperanto, speciale en la rilato kun lia patro Ferdinand Hodler, aktualigas la sciojn pri la fondo de UEA kaj alportas novan lumon pri lia agado favore al la militkaptitoj.

Servo subtenata de
Universala
Esperanto-Asocio
kaj Internacia Ligo
de Esperantistaj
Instruistoj



Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj
Mirejo Grosjean



ENHAVO

- Hodler
- AMO 72
- Ŝtopi malfortojn
- Rekomendoj por Landaj kaj Fakaj Asocioj

Plie tiu libro substrekas la verkistan talenton de Hector Hodler. De la junaĝaj tekstoj energiplenaj kaj idesprucantaj ĝis la gazetaraj artikoloj regule verkitaj por la Revuo *Esperanto*, kiun li redaktis, Hector Hodler montriĝas kiel pensulo profunde enradikiĝanta en sia epoko, kiel homo kapabla konkretigi siajn surpaperajn ideojn en konkretajn agadojn, kiuj ankoraŭ hodiaŭ estas agnoskataj ne nur en la Esperanto-movado sed pli vaste tra la mondo.

La aŭtoroj

Marine Englert estas arthistoriistino kaj projekt-respondeculino ĉe la Arkivoj Jura Brüscheiler. Ŝi esploris kaj ordigis la dokumentaron pri Hector Hodler kaj gvidis la konkretigon de la libroeldonado.

Charles Heimberg estas historiisto kaj profesoro pri didaktiko de historio en la Ĝeneva Universitato. Li verkis doktoran tezon pri la ĝenevaj laboristaj movadoj inter 1885 kaj 1914 kaj estas aŭtoro de artikoloj pri la didaktiko de historio.

Christian Lavarenne estas historiisto kaj esperantisto. Li verkis doktoran tezon pri la interna ideo de Esperanto kaj ties rolo. Li fakulas pri la diplomaciaj agadoj de Hector Hodler kaj specife pri la rilatoj de Hodler kun la Ruĝa Kruco.

Ulrich Lins estas germana historiisto, fakulo pri la historio de la Esperanto-movado. En sia verko *La danĝera lingvo* li esploras la agojn de diktatorecaj reĝimoj kontraŭ Esperanto tra la dudeka jarcento. La verko estas tradukita en sep lingvojn. Franca traduko estas preparata.

La libro nun estas mendebla en la Libroservo de UEA je prezo de €33.90. Vidu: <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9859>

uea Universala Esperanto-Asocio

starta paĝo > katalogo > Hector Hodler

Serĉado
Novaj varoj
Abonoj

Brokantajoj

Mendo
Kategorioj
 ▶ Varo: Hector Hodler
Recenzoj
Statistiko
Eiŝuto
Helpo
Ligiloj

SPECIALA OFERTO!

Hector Hodler

Titolo Une posture pacifiste / Pacisma sinteno

Kategorio Eseoj

Prezo 33.90 €, sesona rabato ekde 3 ekz.

Eldonloko, jaro Genève, 2020

Eldoninto Notari

Klarigoj Eseoj de M. Englert, Ch. Heimberg, Ch. Lavarenne, U. Lins plus tekstoj de H. Hodler.

Kontribuantoj Red. Marine Englert

Tradukisto, lingvo M. Grosjean, Ch. Lavarenne /

ISBN/ISSN 9782940617388

Formato 229 paĝoj, 25 cm

Karakterizoj Kolorilus. Dulingva (franca, E)

Recenzoj Recenzoj mankas. **Aldonu**

En kelkaj landoj

Elektu por mendo ekz.

EKOmentario

“Kompreneble la estraro kaj la movadanoj volas laŭdi kaj subteni niajn sukcesojn. Tamen gravas koni pli detale niajn malfortajn punktojn, por krei planojn limigi ilin. Ni triumfos ne tiom pro niaj atingoj, sed pro nia kapablo kuraci niajn malfortojn.”

Aliĝu al la 72a seminario pri Aktivula Maturigo (AMO): ‘Ni stopu la truojn

Smg

AMO 72 progresas – ni ŝtopu la digojn



Post ĉ. tri semajnoj okazos la unua AMO-seminario de 2021. La celo de la seminario estas esplori nian movadan mondon po-regione. Tiel ni vidos, kiuj landoj kaj areoj prosperas movade, kaj kiuj montras mankojn. UEA vokas al ĉiu landa kaj faka asocio partopreni la seminarion. Gravus ankaŭ reprezentantoj de la regionaj komisionoj, kiuj havas la taskon kunordigi la agadon en la unuopaj landoj kaj fakaj terenoj.

Ni nun jam aldonas preparan materialon, por kuraĝigi al pensado, kaj instigi unuopulojn partopreni la seminarion. Ĝi analizas la mondon laŭ la ses regionoj uzataj en <Landa Parad'>. Krome ĝi dokumentas la rolon de la ses aliĝintaj Fakaj Asocioj de UEA – por instruistoj, blinduloj, fervojistoj, medicinistoj, komercistoj kaj sciencistoj. Krome ni aldonas la kvar mapojn, kiuj aperas en la prezentaĵo, por ke vi povu vidi ilin kun plia grandigo. La mapo por la Centra Ameriko aldonas landojn, kiuj formale ne apartenas al tiu regiono, sed fopрте povos influi ĝin.



La seminaria titolo rilatas al la nederlanda knabo-heroo Hans Brinker, kiu forlasis sket-konkurson, kiam li rimarkis truon en digo protektanta la apudan vilaĝon. Li per sia fingro ŝtopis truon ĝis venis la vilaĝanoj por ripari tiun digon. (Vidu EKO 4.)

Anoncitoj por pli fruaj seminarioj ricevos informoj pri la aliro por la reta kunsido en la 10a kaj aprilo (sabate), kun longigo en la 11a (dimanĉe) se pravigebla. Por aliaj, anoncu vin al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com> aŭ mamduhi<ĉe>gmail.com. La seminario okazos kadre de la irana nacia kongreso. IREA subtenis teknike jam multajn AMO-seminariojn.

===== vortoj: 925 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2020. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.